# *Prezidento de Kubo komencas turneon tra Karibio*



Havano, dec 3 (RHK) Prezidento Miguel Díaz-Canel hodia? komencis turneon tra karibaj nacioj, kiu inkluzivos lian partoprenon kune kun pluraj ministroj en la VIII Karikom-Kuba Pintkunveno okazonta en Barbado venontsemajne.

La prezidento anoncis en sia tvitera profilo, ke li faros oficialajn vizitojn al Sankta Vincento kaj Grenadinoj, Barbado kaj Grenado, landoj, kiujn li konsideras fratoj de Kubo, kunigitaj de "proksimaj ligoj de amikeco kaj historio de subteno en la plej malhelaj tempoj".

La ?tatestro rememoris la vortojn de la gvidanto de la Kuba Revolucio, Raúl Castro, kiu esprimis, ke "Unui?inta kaj subtena Karibio estas nia sola vojo".

Li anka? substrekis ke kiam Usono kaj la Organizo de Amerikaj ?tatoj devigis la tutan Latin-Amerikon rompi rilatojn kun sia lando kaj nur la subteno de Meksiko restis, kvar lastatempe sendependaj karibaj nacioj (Jamajko, Gujano, Barbado, kaj Trinidado kaj Tobago) establis diplomatiajn rilatojn kun la plej granda insulo de Antiloj.

"Por memorfesti ?in ni estos en Barbado ?i tiun 6an de decembro," li aldonis.

Siaflanke, eksterafera ministro Bruno Rodríguez atentigis en la menciita socia reto, ke oficialaj vizitoj estos okazo por da?re profundigi rilatojn de amikeco, kunlaboro kaj solidareco.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/306880-prezidento-de-kubo-komencas-turneon-tra-karibio

**Radio Habana Cuba**